

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

<http://satesperanto.free.fr/> *** retadreso: satesperanto@free.fr




Decembro 2005 76-a jaro, n-ro 12 (1206)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €



Pacajn bondezirojn el Suda hemisfero !

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

La unua SAT-kunsido de koreoj



Enkonduko pri SAT en korea lingvo dum la 37-a korea kongreso de esperanto



Ĉeestantoj de SAT-kunsido post la fakkunsido

La 8-an de oktobro 2005 estis la memorinda tago por koreaj esperantistoj progresemaj ĉar en tiu tago okazis la unua fakkunsido de SAT en la longa historio de sudkorea Esperanto-movado.

Kompare kun la tre viglaj sociaj movadoj de Sudkoreio, ĝis nun silentis progresemaj esperantistoj de Sudkoreio. Kompreneble de tempo al tempo estis SAT-favoratoj individuaj, sed bedaŭrinde ili ne povis organiziĝi, daŭrigi siajn agadojn kaj devis kabei laŭvice.

Ekde la pasinta jarfino, kelkaj samideanoj nature konsentis ekkomenci SAT-agadon en Sudkoreio. Ok samideanoj aliĝinte al SAT de kuranta jarkomenco, ĉiun du monatojn kunsidis diskutante pri utilaj manieroj de SAT-movado kaj pro ĝia rezulto, ni decidis okazigi la fakkunsidon de SAT en la 37-a korea kongreso de Esperanto, kiu okazis je la 8a-9a de oktobro 2005.

Je la 5a-6a posttagmeze okazis la unua signifoplena SAT-kunsido de sudkoreoj kaj sciigis ĝian oficialan movadon. Ok SAT-anoj kaj favoratoj ĉeestis

en la fakkunsido kaj 2 el 8 estis alilandanoj (japano kaj aŭstraliano) kaj 2 el 8 estis favoratoj al SAT kaj 4 el 8 estis koreaj SAT-anoj. 4 aliaj ne povis aŭ ĉeesti aŭ atingis post la kunsido pro kelkaj kialoj.

K-do YAMASAKI Seikō el Japanio speciale flugis al Suda Koreio por ĉeesti kaj kuraĝigi la ekiĝon de korea SAT-movado, kaj li intence menciis kaj gratulis oficialan ekagadon de korea SAT-movado en la malferma ceremonio de la kongreso.

Kvankam nur unu horo estis aranĝita por nia kunsido, tamen ni diskutis kiel vigligi SAT-movadon en Koreio kaj aŭdis spertojn de japana kaj aŭstralia kamaradoj. Samtempe ni interŝanĝis opiniojn kiel kunlaborigi SAT-anojn de Azio. Plie ni povis trovi kelkajn SAT-favoratojn, kiuj neniam aŭdis pri SAT.

Kun grandega sonĝo sed kun plej malgranda paŝo, ni ekos paŝon post paŝo, tagon post tago atendante elkorajn subtenojn, kritikojn kaj kunlaboron de vi ĉiuj.

Via Choi ManWon



Karaj,

Lastjare, la decembra Sennaciulo bondeziris al vi per la bildo el norda hemisfero kie la nova jaro komenciĝas plej ofte sub la neĝo, kion ankaŭ la bildo montras. Sed, SAT estas Sennacieca Asocio Tutmonda, kaj kvankam la sidejo estas en la norda hemisfero, multaj el niaj membroj vivas en la suda hemisfero. Pro tio, ĉi-jare, ni sendas al vi bondezirojn el la regiono de nia planedo kie la jaro komenciĝas somere - kaj kien la julpatro venas por ĝui sunon kaj aliajn mirindaĵojn de nia mirinda planedo. Ni esperas ke tiu belega bildo varmigis la korojn de la nordaj SAT-anoj (la sudaj jam estas varmaj!).

La Redakcio



ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la CD en la formatoj de Word, Apple (Clar)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

El la redaktejo...

Karaj, jen la lasta ĉi-jara Sennaciulo kun iom surpriza frontpaĝo. Klariĝon vi trovos maldekstre sube. Kun la gazeto vi trovas kongresaliĝilon, ĉar la pasintnumera estis fuŝita. Do aliĝu tuj. Ne forgesu voĉdoni; la referendumilon vi jam havas. Estas la fino de la jaro kaj momento repaĝi vian kotizon por 2006. La kotiztarifojn vi trovas en la gazeto. Faru ankaŭ tion tuj, por ne forgesi. Tiel vi eniros Novan jaron 2006 sen zorgoj pri viaj devoj rilate al via kara Asocio. Do, ni finas tiun ĉi jaron kun espero ke la nova alportos al ni ĉiujn pacon, sanon, pli justan, pli socialan mondon al kio ni ĉiuj klopodas alporti nian guton. Al SAT ni deziru novajn membrojn, pli da aktivuloj kiuj kune batalos por la celo de nia laborista Esperanto-movado. Do pacan kaj sukcesan Novan 2006 al ĉiuj el vi deziras



Via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj: <http://satesperanto.free.fr>
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registriilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSTFRPPPAR
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro: Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
N° CPPAP 0510 G 86567
Limdato por ricevo de kontribuajoj estas ĉiam la 10-a en la monato.




POR LA PACO !

Sekvo de Zagreba Kongreso

La 6-an de oktobro 2005 okazis ĉe la Palaco de Luksemburgo en Parizo kolokvo pri la temo «Pafaĵetoj el bomboj» organizita de Neregistara Organizo «Internacia Handikapo».

Pafaĵetoj el Bomboj

Malfermo de la kontenero



Disĵeto de pafaĵoj

La kolokvo celis :

Unue – Informi pri la danĝero de pafaĵoj elĵetitaj el bomboj aŭ obusoj ĉar 5% ĝis 30% de pafaĵoj ne eksplodas kiam ili alvenas sur la grundon, kaj tiuj disŝutitaj pafaĵoj sur tero agas tiam kiel kontraŭpersonaj minoj.

Due – Montri ke kampanjo por malpermesi la uzon de «pafaĵetoj el bomboj» komenciĝis en la Mondo. Aŭstralia Senato, Dana kaj Norvegia Parlamento kritikis la uzon de «pafaĵetoj el bomboj». Germana Parlamento kaj Itala Senato devus ekzameni la uzon de tiaj armiloj.

Partoprenis interalie en la kolokvo la Belga Senatano, Sinjoro Philippe Mahoux (Filipo Mahu) kaj Sinjoro Emmanuel Mandon (Emanuelo Mandon), kiu estas la parlamenta ataŝeo apud la deputito François Rochebloine (Francisko Roŝbluan). Sinjoro Emmanuel Mandon anstataŭis kaj reprezentis la deputiton, kiu estis en eksterlanda misio. La Belga Senatano prezentis sian leĝproponon, kiun la Belga Senato debatis. Sinjoro Emmanuel Mandon prezentis la leĝproponon de François Rochebloine, kiun la Franca Parlamento ne ankoraŭ debatis, sed tiu leĝpropono jam estas subskribita de 27 aliaj deputitoj. Tiuj du leĝproponoj havas la saman celon : Malpermesi la uzon kaj la fabrikadon de «pafaĵetoj el bomboj».

Dum sia interveno Sinjoro Emmanuel Mandon, kiu parolis nome de Sinjoro François Rochebloine, diris :

« ... Necese estus, ke internacia ago estu entreprenota por modifi la unuan frazon de la unua paragrafo de artikolo 2 de Konvencio de Otavo. Mi proponas anstataŭigi la aktualan frazon per la jena frazo :

Estas konsiderata kiel kontraŭpersona mino ĉiu armilo, kiu eksplodas pro la ĉeesto, la proksimeco aŭ la kontakto nevolaj de unu persono, kaj, kiu eksterbatale metas, vundas aŭ mortigas unu aŭ plurajn personojn.

Persone mi promesis al Monda Esperantista Asocio "SAT", kies sidejo estas en Parizo, prezenti ĉe la Parlamenta Asembleo de la Konsilio de Eŭropo, kies membro mi estas, unu paragrafon de la Deklaracio de ĝia Kongreso, okazinta komence de julio en Zagrebo (HR), kiu petas la plivastigon de la kampaŭpliko de la Konvencio de Otavo al ĉiu armilo, kiel mi priskribis ĝin ĉi-supre. La celo de mia interveno ĉe la Konsilio de Eŭropo estas instigi la deputitojn, kiuj reprezentas 45 landojn, agi pri tiu temo apud ilia registaro».

Daŭrigota afero.

André kaj Colette Weiss